

n-ro 59

januaro 1998

## Internacia Tradukreto ekde nun rete atingebla

Daniel Durand, respondeculo de ITRE, atingeblas per retadreso <dan.cdm(a)wanadoo.fr>. Ĉiuj informoj pri ITRE-kunlaborantoj estas en la TTT-paĝoj: <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/kio.htm>.

Kotizo por interretuloj: 190 BEF (al konto itre-g ĉe FEL), 10,50 NLG (al konto itre-g ĉe UEA) aŭ 6 IRK.

## Kotizo por 1998

Bonvolu kontroli la adresetikedon sur la koverto. Se vi ne pagis vian kotizon por 1998, bonvolu baldaŭ fari laŭ instrukcioj sur sekva paĝo. La kasisto dankas vin !

## Enhavo

Novjara saluto de la prezidanto .....	3
Projekto Profesia Reto - Transiro al eŭro - Retadresaro de IKEF-membroj ? .....	4
Anoncitaj aranĝoj .....	5
Komercaj petoj kaj proponoj .....	7
Novaj membroj .....	9

---

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikō Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

IKEF-informoj en Interreto: <http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/ikef.htm>

---

La **jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD). Kiu aliĝas meze de la jaro, pagu por 18 monatoj (900 aŭ 600 BEF).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c  
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartnumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj). La IRK estu stampitaj de la eldonanta poŝtoŝtifejo.

**Perantoj**:

Ĉeĥio: S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE

Cinio: S-ro **WANG Tianyi**, Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, rete komerco(a)public.xa.sn.cn

---

Francio: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon  
(CCP 1275-89 L Nancy)

Germanio: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank  
Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

Hungario: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

Italio: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro **YAMASAKI** Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12;  
retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

---

### Novjara saluto de la prezidanto

Estimataj gekolegoj, karaj IKEF-anoj,

La nova jarmilo alproksimiĝas, kvankam ni hodiaŭ nur troviĝas en la komenco de la jaro 1998. Pruvo por la enkonduka konstato estas la "Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo" lanĉita de UEA. Temas pri agadprogramo kun klaraj, celtrafaj strategio kaj taskoj, por antaŭenigi Esperanton en la publika opinio. Ĉiuj grupoj kaj asocioj aliĝintaj al aŭ kunlaborantaj kun UEA - do ankaŭ ni - estas invititaj al kuna koncentrita agado.

La estraro de IKEF pridiskutos dum la venontaj monatoj la taskojn farendajn de ni kaj ellaboros tiurilatan krudan agadplanon. Tiun ni prezentos en deca tempo al niaj membroj por interdiskutado kaj posta finpretigo. Mi opinias, ke nia ĉi-jara Ĝenerala Kunveno dum la Universala Kongreso en Montpellier estos bona kaj ĝusta loko por findiskutado kaj aprobo. Mi invitas ĉiujn de vi jam nun, ke vi - post ricevo de la estrara malneto - aktive kun-diskutu kaj -laboru.

Bonan jaron 1998, plenan de sano, feliĉo kaj prospero por vi kaj viaj familianoj, sed ankaŭ riĉa pri entuziasmo kaj ĝojigaj sukcesoj en via aktivado por IKEF kaj Esperanto

tion elkore deziras al vi

Franz Josef BRAUN, Prezidanto

### Perantoj

**Ĉinio:** nova adreso de WANG Tianyi: Jiangong-lu 3, CN-710043 XI'AN, telefono+fakso 0086 29 2232952; rete komerco(a)public.xa.sn.cn.

**Ĉeĥio:** s-ro Vladislav HASALA estas akceptata kiel peranto.

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo (FEL) (IKEF 65) kandidatiĝas kiel peranto belga kaj internacia. Konforme al la Regularo por perantoj, la prezidanto kaj kasisto de IKEF proponas la nomumon de FEL. La nomumo iĝos definitiva se neniu malaprobos

---

ĝin ene de 3 monatoj ekde 30 januaro 1998.

### Eŭro

La Eŭropa Komisiono alvokis la eŭropanojn uzi la oficialan simbolon de la eŭro. Tra Interreto ĝi akireblas je <http://europa.eu.int/euro/>.

---

### Projekto Profesia Reto

Post mia projektpropono en LM de oktobro 1997 mi ĝis nun ricevis 12-on da reagoj. Mi intencas kolekti reagojn ĝis la fino de 1997 kaj sekve kontaktos la reagintojn en la komenco de 1998. Dankon al ĉiuj kiuj reagis.

Inĝ. Kees RUIG

### Transiro al eŭro: rondigoj

Okaze de transkalkulo de unu valuto al alia necesas rondigi ciferojn. Tio neeviteble kaŭzas (kvankam etajn) diferencojn. Por laŭeble eviti tiajn diferencojn la eŭropaj instancoj enkondukis kelkajn regulojn.

\* La kurzoj estas fiksitaj kiel valoro de 1 EUR en alia valuto, kun 6 signifohavaj ciferoj, ekzemple 1 EUR = 40,2171 BEF (fikcia ekzemplo).

\* Sumoj kalkulotaj de unu nacia valuto al alia (ekzemple BEF al FRF) unue estu kalkulataj al EUR, eventuale rondigataj je minimume 3 decimaloj, kaj poste kalkulataj al celvaluto. Ekzemple, supozante ke 1 EUR = 40,2171 BEF = 6,59993 FRF: 1000 BEF -> 24,865 EUR -> 164,11 FRF.

\* EUR estas rondigata al plej proksima eŭrocentono. Se la rezulto estas precize duono de eŭrocentono, oni rondigu al supra eŭrocentono.

RR

### Ret-adresaro de IKEF-membroj ?

WANG Tianyi sugestas ke ekzistu adresaro de IKEF-membroj rete atingeblaj. Tio plirapidigus la komunikadon. Li pretas kunordigi tian liston. Do, sendu retmesaĝon kun via nomo, membronumero kaj retadreso al WANG Tianyi, <komerco(a)public.xa.sn.cn>

### 50%-a rabato pri komputiloj kaj komputilaj partoj

---

Entreprenejoj uzantaj Esperanton ricevas 50%-an rabaton se ili aliĝas al la varokatalogo "Comp-Info", funkcia en Interreto. La varokatalogo troviĝas je <<http://www.compinfo.datanet.hu>>. Informoj: Princz Oszkár <[espertur\(a\)mail.c3.hu](mailto:espertur(a)mail.c3.hu)>.

---

#### Anoncitaj aranĝoj

**Hamburgo, Germanio**, 20-22 februaro 1998: ELTEKO-6, internacia laborgrupo pri elektroniko, telematiko, komputiko. Informoj: rete <[duhme\(a\)stud-mailer.uni-marburg.de](mailto:duhme(a)stud-mailer.uni-marburg.de)>, <http://members.aol.wdherndon/ELTEKO.htm>.

**Ancona, Italio**, 14-17 majo 1998: Foiro pri fiŝkaptado kaj marproduktoj. Fakso: +39-71-5897213.

**Trieste, Italio**, 18-24 juli 1998: Kultura heredaĵo de Romo (prelegoj kaj debatoj); debato kaj voĉdonado por OSIEK-premio. Informoj: Elda Doerfler, Triesta Esperanto-Asocio, C.P. 601, TRIESTE, Italio aŭ Eric Laubacher, 1 rue des Vosges, F-78180 MONTIGNY - LE - BRETONNEUX, rete <[eric.laubacher\(a\)mail.dotcom.fr](mailto:eric.laubacher(a)mail.dotcom.fr)>.

En biendomo je 30 km de **Montpellier, Francio**, 28-30 julio 1998 (antaŭ UK): kunveno pri uzo de senmonaj interŝanĝaj sistemoj (SIL [sistemo pri interŝanĝoj lokaj], RIS [retoj pri interŝanĝoj de scioj], angle LETS [local exchange and trading system]). Ankaŭ diversnivela lingvaj staĝoj. Informoj: René BALLAGUY, 12 rue du Cdt Cousteau, F-95000 BOISEMONT, rete <[rene.ballaguy\(a\)hol.fr](mailto:rene.ballaguy(a)hol.fr)> aŭ <http://wwwperso.hol.fr/~rballagu/>.

**Pekino, Ĉinio**, 19-25 aŭgusto 1998: Sesa Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto. Samtempe okazos Internacia Somera Semajno por Geknaboj kaj Gejunuloj. Informoj: Sciencista Teknikista Esperanto-Asocio, ĉe Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, CN-100864 BEIJING; fakso: 0086-10-6851-2458; reto <[lrf\(a\)lasgsig4.iap.ac.cn](mailto:lrf(a)lasgsig4.iap.ac.cn)>.

#### Tradukistoj serĉataj

La berlina artisto Roland Kreuzer serĉas tradukistojn kiuj helpas lin realigi art-aranĝon 'weltfragen'. Li bezonas tradukojn de kvar demandoj de la germana filozofo Kant. La tradukistoj bone sciu la gepatran lingvon, la germanan lingvon kaj la filozofion (de Kant). Kreuzer jam havas tradukojn en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj. Li ankoraŭ bezonas la estonan, la lativan, la retoromanan kaj ne-eŭropajn lingvojn (krom la araba, georga kaj hebrea lingvoj, kiujn li jam havas).

---

Kiu konas tradukistojn kiuj pretus kunlabori ? Bonvolu doni al ili mian adreson: Alfred SCHUBERT, Pf. 1539, D-82355 WEILHEIM, Germanio. La laborlingvo por la korespondado kun la tradukistoj estas la germana; kun perantoj mi volonte korespondas esperante.

Alfred SCHUBERT (IKEF 126)

---

### Frekvencaro de la Esperanto-Redakcio de Radio Havano, Kubo

Je la 11a de septembro 1997 la redakcio iĝis 9-jara. Adreso por gratuloj: pf. 6240, Havano, Kubo.

Horaro (dimanĉe):

Horo (UTC)	Regiono	m	khz
07.00	Norda Pacifiko	31	9820
15.00	Tuta Ameriko	25	11760
19.30	Eŭropo	21	13715
22.00	Eŭropo	21	13715
23.30	Tuta Ameriko	25	11760
		49	6070

### Terminologiaj komisionoj de TAKE

Ĉe TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) ekzistas diversaj terminologiaj komisionoj, ekz. pri:

- ĝenerala konstruado - multlingva terminaro (B. Ĉupin kaj I. Drul)
- terminaroj pri betono (J. Werner kaj H. Wiersch)
- vortlisto/gvidlibro pri kaheloj (M. Basso)
- vortlisto pri konstrua ilaro (H. Wiersch)
- diskuto pri la subdividoj de la konstruteknikaj fakoj (J. Werner kaj F. van Mook)

La komisionoj estas malfermaj al ĉiuj, ĉu spertaj aŭ ne. Nur gravas ke oni havas iom da tempo kaj iom pli ol averaĝan intereson al terminologiaj demandoj en la konstru-teknika kampo.

Informoj: s-ro Fabien van Mook, Molenstraat 46c, NL-5701 KG HELMOND, Nederlando, rete: famo(a)fago.bwk.tue.nl.

Informoj pri TAKE: RN 83 - Rue de Tiefenbach, F-68920 WINTZENHEIM (COLMAR), Francio, rete: take.ladomo(a)wanadoo.fr.

### Asekura Terminaro

En LM 56, p. 9, mi menciis ke Marc Vanden Bempt preparas asekuran terminaron. Enestas ĉ. 1250 terminoj en lingvoj

---

nederlanda, franca, germana, angla, hungara kaj esperanta, plejparte kun difinoj en Esperanto. Li urĝe serĉas reviziantojn por la lingvoj franca, angla kaj hungara. Prefere reviziantoj sciuj pri ekonomiko (financoj, bankoj kaj/aŭ asekuroj), sed tio ne nepre necesas. Adreso: Marc VANDEN BEMPT, Rulenslaan 10, B-3020 HERENT, Belgio (nova adreso !).

RR

### Komercaj petoj kaj proponoj

#### **Bjelorusio**

Muntado de teĥnologiaj instalaĵoj, tublinioj, metalkonstruoj; produktado de nenormigitaj instalaĵoj kaj metalkonstruoj; fundamentaj riparoj de instalaĵoj de ĥemiaj kaj naftofabrikoj kaj industriaj entreprenoj. S-ro Genadzi Kurgun, BSPM, PR-T J. Kupaly 54-64, BY-230010 GRODNO, fakso 44-27-35.

#### **Britio** (por Mez-Orienta lando)

Aĉet-enketo por 500.000 gas ŝtalaj cilindroj 590x310x3 mm por doma uzado (kun butan-gaso kaj simila). Pri detaloj bonvole kontaktu: Lamily Exports (UK), 134 Brent Road, Southall, UB2 5LD, Britujo; telefono +44-181-571 2697 - fakso +44-181-893 5960.

#### **Ganao**

Vendas afrikajn kulturaĵojn kaj vestaĵojn. Aĉetas elektronikaĵojn, komputilojn kaj skribilojn. Angle, france, esperante. S-ro Atayi Ayikoe, Box 2030, TEMA - COMM.I, Ghana.

#### **Germanio/Pollando**

Profesia helpo por firmaoj, kiuj volas kunlabori (kuna entrepreno, aĉeto, vendo, ktp) kun polaj firmaoj. Vendado de uzataj presiloj Heidelberg. Kontakto (esperante, germane, pole): s-ro Jan Dziurka (IKEF 248), Hofstr. 4, D-41065 Mönchengladbach, fakso +49 2161 209008.

#### **Kongo** (eks-Zairio)

Ni disponas pri multaj produktoj por internacie komerci, ekz.:

- 
1. zingibro en pulvoro en paketoj de 50 g
  2. zingibro sekigita kaj distranĉigita en paketoj de 100 g
  3. pimento en pulvoro en paketoj de 50 g
  4. freŝa pimento en ujo de 500 ĝis 800 g
  5. bulukutu en pulvoro en paketoj de 100 g
  6. sojo en grajno kaj pulvoro en paketoj de 100 g
  7. ligno

MBiya TEKADIOMONA, AVOLAR (Association des Volontaires pour l'Auto-Promotion Rurale), B.P. 9657, Kinshasa I, Rép. Dém. du Congo.

Por nia komercejo ni deziras kredite aĉeti: sunombrelojn, trikotojn, ĉemizojn, sportopantalonojn, kajerojn, sakojn, ŝuojn, kravatojn, ĉapelojn. Konga Esperanto Rondo, Immeuble Salemite, Av. Bongolo N° A/15, Yolo-Nord 3, B.P. 6055, Kinshasa VI, Rép. Dém. du Congo.

#### **Slovakio/Francio**

Slovaka entrepreno proponas diversajn balzamojn (malŝminkan, por la kruroj, afterŝavo), nepakite aŭ en flakonoj. Eblas meti etiketojn diverslingve. Ankaŭ proponas tonusdonajn granulojn (ĝinsengon kaj diversajn plantojn) nepakite. Kontakto: Bimont (IKEF 244), 5 rue Bérenger, F-60200 COMPIEGNE, fakso 03.44.83.37.05.

### Expo 1998 en Lisbono, Portugalio

Vizitantoj de la monda ekspozicio vizitu ankaŭ aliajn portugalan vidindaĵojn, ekzemple la tradician studentan urbon Coimbra. Je malpli ol 20 km de Coimbra situas la kvietaj urbeto Penacova, kie Kooperativo Saluton posedas feriejon malfermitan al geesperantistoj. Tie, vi povas ripozi kaj ĝui belan pejzaĝon. El tie eblas ĉirkaŭvojaĝi por ekkoni diversajn vidindaĵojn.

Mendoj kaj informoj: S-ino Salette Santos, Cooperativa Cultural de Amigos do Esperanto e da Natureza, Rua do Miradouro 12, PT-2735 CACEM; tel. (01)914.0666.

(el Saudação Informilo, 4-6/97)

### Revuo pri komercaj markoj

OHIM (Office for Harmonization in the Internal Market) estas EU-ofejo respondeca pri komercaj markoj kaj desegnoj. Ĝi eldonas dumonatan, senpagan revuon en angla lingvo, OAMI News. Adreso: OAMI, Av. de Aguilera 20, E-03080 ALICANTE, Hispanio; fakso (34-6) 513.91.73.

### Turismaj informoj en Interreto

Kun helpo de la E-grupo de Hérouville, Francio, la Priturisma Regiona Komitato de Normandio aldonis Esperanton al siaj retpaĝoj. Vizitu ilin je <http://www.normandy-tourism.org>.

### IKEF perdis du italajn membrojn

Pro aŭtomobilakcidentoj forpasis IKEF-membroj Paolo Cerretini (je 10.6.1997) kaj Aldo Viotto (je 14.10.1997). Estas grava perdo por IKEF kaj, en kazo de s-ro Viotto, ankaŭ por la E-Asocio de Trieste kaj por 'La Eta Gazeto', kies redaktoro li estis.

### Novaj membroj

246. S-ro Mulungula Mukeba Jules, c/o Chikolongo, P.O. Box 37802, LUSAKA 10101, Zambio  
247. S-ro DONG Zhongfa, Linhai Green Star Information Co Ltd, Zhutian-Xiang 8, CN-317000 LINHAI, ZHEJIANG  
248. S-ro Jan DZIURKA, Hofstr. 4, D-41065 MÖNCHENGLADBACH, fakso +49 2161 209008  
249. S-ro Isaac Kwarte QUARTEY - Migrujchas Business Ventures, P.O. Box 866 Teshie - Nungua Estate, ACCRA, Ganao  
250. S-ro Silvio Knies MATES, Rua Tenente Silveira, 199 sala 504, Centro - Florianopolis - SC, Cep 88.010-300, Brazilo, tel. +55 48 2246610, 960 2886, fakso 2225161, rete <silvio(a)mail.com>  
251. S-ro Marc VANDEN BEMPT, Rulenslaan 10, B-3020 HERENT  
252. S-ro André MERTENS GOOSSENS, Priorijstraat 4, B-1702 GROOT-BIJGAARDEN, Belgio  
253. Inĝ. Marian G. IVANOV, merkato-tekstilproduktado, j.k.

Zlaten Rog bl. 27 st. 373, BG-8600 YMBOL, Bulgario, tel. 00 359 046 3-55-86  
254. S-ro Harri J. MELASNIEMI, Mikonkatu 4 C 67, FIN-20100 TURKU 10, Finnlando  
255. S-ro H. Lamily - LAMILY EXPORTS (UK), 134 Brent Road, Southall, UB 2 5LD, Middlesex, Britio, tel.+44-181-571-2697, fakso +44-181-893-5960

### Identec&ildido

Nomo: Isaac Kwarte QUARTEY	Membronumero: 249
Profesio: instruisto, komercisto, valoristo	Naskiĝjaro: 1967
Nomo de la firmao: Migrujchas Business Ventuers	
Adreso: P.O. Box 866 Teshie - Nungua Estate, ACCRA, Ghana	
Telefono: 669470	
Proponataj servoj: konstruado de domoj, vendado de malnovaj aĵoj	
Bezonataj varoj: IBM- kaj NEC-kongruaj personaj komputiloj	
Lingvaj kapabloj: angla, esperanto	

### Valorigi neglektitan produkton: produktado kaj klimatizigo de zingibro\*

La zingibro estas planto kiu havas multajn beneficajn efikojn por homo en nutro kaj en tradicia kuracado. En nutro ĝi estas uzata kiel plibonigo de manĝaĵo kaj kiel aromo en la fabrikado de kukoj, varmaj kaj malvarmaj trinkaĵoj kaj en diversaj manĝaĵoj. Ĝi ankaŭ estas trinkata por stimuli manĝbezonon.

Malgraŭ sia kvalitoj, la zingibro estas malbone ekspluatata kaj ĝi ne donas profitigan aktivecon por tiuj kiuj ĝin kultivas. La preparametodo estas ĵaluze gardita per homoj kiuj konas la utilecon kaj ne donas higienan garantion. Tiu labormetodo havas plurajn konsekvencon. Ekzemple, la konservado estas malfacila kaj ofte dum la tradicia traktado oni konstatas perdon de aromo.

Tio instigis AVOLAR produkti pulvoran zingibron kaj ĝin klimatizigi por pli bona konservo. La transformo de la zingibro okazas laŭ jenaj etapoj:

- lavado kaj senŝeligo de la produktoj,
- tranĉado kaj sekigado (sub la suno aŭ per elektra sekigilo),
- pulvorigo per muelilo.

La klimatizigo fariĝas en travidebla plastujo. Pakigata en materialo kiu malebligas perdon de kvalito pro sunlumo, pulvorigita kaj klimatizigita zingibro konserviĝas en loko kun normala temperaturo dum dekdu monatoj.

Mbiya Tekadiomona

\* zingibro: genro (Zingiber) de plurjaraj, tropikaj herboj kun tubereca, artikeca, aroma rizomo... (Plena Ilustrita Vortaro)

#### Benino: orfejo kaj bredejo en Tuzunme

Kiu interesiĝas pri la vivo de la georfoj, povas helpi per financaj donac(et)oj aŭ disponigante medicinaĵojn. Ni ankaŭ bezonas financadon por konstrui restoracion apud nia bredejo. Ni intencas utiligi la bredejajn bestojn en la restoracio por vizitantoj kaj feriantaj studentoj. Financota sumo estas almenaŭ 15.000 DEM. Tiun sumon ni repagos parte aŭ tute se ni akiras aliajn subvenciojn, ekzemple kadre de Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato.

Skribu al suba adreso; mi ankaŭ estos en la UK en Montpellier.

Gaston HOUSSOU, B.P. 163, Cotonou, Bénin

#### Komercaj leteroj en Ĉinio

Entreprenoj dissendas leterojn por ke la adresatoj pli bone konu iliajn varojn kaj servojn. En evoluintaj landoj tia varba korespondado iĝis unu el la plej gravaj reklamiloj. Ĉiu landano tie ricevas jare pli ol 600 leteroj, el kiuj pli ol 92% estas komercaj.

En Ĉinio oni meznombro sendas malpli ol 6 leterojn, el kiuj nur 10% por komercado. La kosto de unu letero mezume estas 0,7 juano, inkluzive de sendokosto kaj farkosto, apenaŭ 2% de la kosto de televida reklamo kaj 10% de ĵurnala. Pro la tre malalta kosto, 80% de la ĉinaj entreprenoj kelkfoje reklamas perletere. Por vendi librojn kaj gazetojn preskaŭ ĉiuj sendas leterojn. Eĉ ŝtataj entreprenoj, kiu ĝenerale estas kompare konservativaj pri komerco nun tion faras.

Bedaŭrinde, multaj kvartaloj, stratoj, domegoj kaj loĝejoj ankoraŭ ĝis hodiaŭ ne havas la eblecon ricevi leterojn pro tio, ke oni dum la lastaj 2-3 jaroj finkonstruis ilin, tamen la lokaj registaroj ne sukcesis doni al ili propran nomon. Vole nevole leterportistoj lasas leterojn kuŝi en poŝtoficejoj.

La ĉina poŝto definis sian celon, ke ĝis la fino de tiu ĉi jarcento ĉiu ĉino jare meznombro havos 10 leterojn, sed en la ekonomie bonaj urboj la urbanoj devos havi 80. Laŭ tio, la ĉina leterkvanto ekde nun multiĝos ĉiujare kun rapideco de ĉ. 5 miliardoj da leteroj. Se 3% de tiuj estus varbaj leteroj, do post nur du jaroj troviĝus 3,9 miliardoj da leteroj por komercado.

MU Binghua

(osiek)



---

(fel/jorg)